



# Boletín<sup>★</sup>

de la Federación Española de Esperanto

**forpasis  
D-ro  
Régulo  
Pérez**



**Nº 309 - JANUARO - FEBRUARO - 1993**

# Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Aperonta de 1949

## Ĉef-redaktoro

Antonio Marco Botella  
Av. Compromiso de Caspe,  
27-29, 9º C.  
50002 ZARAGOZA

## Redaktoroj kaj kunlaborantoj

Salvador Gumá Clavell  
Miguel Fernández Martín  
Vicente Hernández Llusera  
Andrés Martín González  
Luis Serrano Pérez  
Miguel Gutiérrez Aduriz  
Antonio Valén Fernández

## HEF

(Informado kaj Administrado)

Federación Española de  
Esperanto

(Información y administración)

c/ Rodríguez de San Pedro  
13, 3º, p-7.

28015 MADRID

Telefono + faksilo: (91) 446-80-79

## Estraro

*Prezidanto:* Antonio Alonso Núñez  
*Sekretario:* Manuel López Hernández  
*Vicprezidanto:* Alberto Franco Ramirez  
*Vicsekretario:* Luis Gil Pérez  
*Kasisto:* José Mª Bernabeu Franco  
(Konto: 14.011.966 de Caja Postal)

*Kovrilo:* D-ro Don Juan Régulo Pérez.

*Noto:* Pri la enhavo de la artikoloj  
respondecas la aŭtoroj mem.

## ENHAVO

HEF-estraro	3
HEF-sidejo	6
Kaj la ceter' - nur literaturo <i>Dien Velk</i>	7
Umberto Eco kaj Esperanto <i>Antonio Alonso Núñez</i>	8
78-a UK de Esperanto en Valencio	11
Forpasis d-ro José Olavide	14
100 jaroj, jam sufiĉas <i>Luis Serrano Pérez</i>	15
Viglas la movado	17
Helenistika artefarita lingvo <i>J. F. Martín del Pozo</i>	19
Ĉu Interlingva estas pli facile lernebla ol Esperanto <i>Bernard Golden</i>	20
La esperantismo kaj ĝia mesaĝo <i>J. M. Galofré Domingo</i>	22
Surogataj argumentoj <i>Georgo Kamaĉo</i>	24
Aplaŭdinda iniciato en Eŭskio <i>Antonio Valén</i>	26
Kiel vigligi la Esperanto-movadon <i>V. Hernández Llusera</i>	27
Nekrologoj	28
Deziras korespondi	28
Jarabonoj kaj kotizoj por 1993	29



La 16-an de januaro, je la deka matene, la estraro de Hispana Esperanto-Federacio kunvenis en la sidejo de la Asocio por pritrakti plurajn aferojn.

## Strategia Plano

De jaroj sentiĝas en nialanda movado la manko de strategia plano klare skizanta la ĉefajn gvidliniojn por la agado de la Hispana Esperanto Federacio.

En la nuna tempo, neniuj serioza organizaĵo povas longe vivi iele trapele. Nur se oni laboras racie, laŭplane kaj discipline, oni ricevos rezultojn, sur kiuj eblos la daŭra kaj pozitiva konstruado de inda estonteco. Tial, la Prezidanto, s-ro Antonio Alonso Núñez, komisiis al s-ro Miguel Gutierrez la preparon de strategia plano por HEF.

La Strategia Plano, proponita de s-ro Gutierrez al la Estraro, estas tiu de UEA, ŝanĝita kaj adaptita al niaj bezonoj tie, kie konvene. Ĉi fakto ŝajnas pravigebla, eĉ se nur pro tio, ke Universala Esperanto-Asocio estas la tegmenta asocio de HEF, kaj ajna malakordo inter ambaŭ organizaĵoj estus absolute absurda, kaj nur alportus malbonon al la E-movado.

Ĉiu estrarano ricevis de la komisiito la proponatan dokumenton, kaj, laŭ ĉies akceptita sistemo, plurajn tagojn poste oni telefone interkonsentis pri korektoj kaj aldonoj, ĝis la ricevo de preskaŭ definitiva teksto. Tiel, en Madrido la afero estis multe pli simpla ol kutime, kaj la diskutado ne postulis tro multe da tempo.

Traktinte do ĉiun probleman punkton, la Estraro aprobis la unuan Strategian Planon de HEF, nur unu horon post la komenco de la debato. La estraro ankoraŭ ne prenis decidon pri la publikigo de ĉi dokumento, sed, espereble, baldaŭ ĉiu membro havos plenan aliron al ĝi.

El la konkludoj de la jam aprobita plano ni povas citi: "ni devas preti draste pligrandigi la rimedojn disponeblajn al la Asocio."

## Administrado

Ĝuste la administra fako prezentas nuntempe unu el la plej malfortaj flankoj de HEF, jen pro la troa diseco de la Estraro, jen pro la ĝisnuna manko de modernaj rimedoj. Tial, la nova strukturo de la Asocio aparte flegas ĉi punkton.

Grandan parton de la januara kunveno la estraro dediĉis al solvado de plej etaj, ŝajne bagatelaj, sed vere gravaj, administraj kaj kunordigaj aferoj. La Prezidanto, s-ro Antonio Alonso, la kasisto, s-ro Jose Maria Bernabeu, la redaktoro de Boletín, s-ro Antonio Marco, kaj la respondeculo de la CO, s-ro Marcos Cruz, abunde traktis dum horoj la necesajn detalojn, por ke la transiro de la nuna administra sistemo al la nova, pere de la ĵus aĉetita komputilo, la printilo kaj la faksilo, fariĝu kiel eble plej glate kaj senprobleme. Apartan mencion meritas la problemoj daŭre kaŭzataj de la membroj, al kiuj oni devas sendi la revuon remburse, ĉar ili simple forgesas pagi sian kotizon ĝustatempe. Al tiuj samideanoj ni petegas iom da atento por eviti ne nur nenecesan ekstran laboron, sed ankaŭ perdon de mono tro necesan por la magraj kasoj de la Esperanta-movado.

Dume, en la apuda ĉambro, komisiono laboris preparante la terenon por la estonteco, kaj finfine sukcesis doni definitivan formon al pluraj decidoj kaj proponoj:

De nun la HEF-sidejo (Centra Oficejo) zorgos pri la ĝenerala korespondado. Ĝia adreso estos la sola "oficiala", kvankam, kompreneble, daŭre funkcios la adresoj de Boletín kaj Libroservo por ties specifaj celoj. Tamen, la membraro devas konscii, ke, ekzemple, oni TUTE NE devas sendi al la Redaktoro de Boletín leterojn administrajn aŭ petantajn informojn.

La CO ellaboros programon por la kas-kontrolo, kaj kiel eble plej ampleksan datum-bazon el adresoj de membroj, ceteraj e-istoj, interŝanĝantoj de Boletín, inform-petintoj kaj aliaj.

**Boletín**  
  
**mi amas vin**

Kiam eble, la CO ankaŭ grade okupiĝos pri perado de aliĝoj kaj abonoj al internaciaj asocioj kaj revuoj.

Same, cele al la maksimuma ekspluatado de sia oficejo, la HEF-sidejo tenos la arkivon de HEF, kaj, manke de pli oportuna ejo, donos lokon al la Esperanta Nacia Biblioteko, kiu devos nutri sin per donacoj, per aĉetoj, per la ekzempleroj de ĉiu interŝanĝata revuo, kaj per ĉiu dua ekzemplero de la libroj ricevitaj por recenzado en Boletín.

Apartan mencion meritas la preparo de kampanjo por la kreskigo de la membraro. Bedaŭrinde la tuta laboro estas submetita al la programo, kiun s-ro Marcos Cruz pretigas por la nova komputilo, kaj, konsekvence, ne eblos ĝin lanĉi ene de la nuna jaro.

## Informado

CO okupiĝos pri la informado interna (pri ĉiu HEF-servo), kaj pri la ekstera (pri Esperanto), jen rekta: al ĝenerala publiko kaj al novaĝ-agentoj (telefone, per nacilingva informilo), jen ne rekta (per senpaga dissendado de inform-materialo, kiun komisiono preparas nun).

Rilate al *Hoja Informativa*, informilo tre necesa por la tenado de regulaj rilatoj kun la novaĝ-agentoj, kaj ankaŭ por la altiro de simpatiantoj ne konantaj nian lingvon, oni prenis la decidon ĝin publikigi en ĉiuj lingvoj de la ŝtato, kondiĉe ke sufiĉe alta nombro da membroj de la koncerna lington petos, kaj ke HEF trovu respondeculon pretan traduki la informilon, kaj sendi la tekston al la kompostisto en komputila diskedo.

Senbube riĉa estis la agado en la madrida kunveno, kie komenciĝis la demarŝoj necesaj por preparo de la nova Estraro elektota en Valencio. Laŭŝajne la aferoj iras glate ankaŭ en tiu tereno, kaj, manke de nur kelkaj kontaktoj, oni povus diri, ke la stabilo de HEF por la venonta estrar-periodo povos esti garantiita.

*La redakcio*

---

### NEKROLOGO


## Forpasis Régulo

Kiam ĉi numero de Boletín survojis al presejo, alvenis al ni la konsterna novaĵo pri la forpaso de prof. Don Juan Régulo Pérez, okazinta la 27-an de januaro. Sendube, Esperanto perdis unu el siaj plej elstaraj homoj.

Nian kondolencon al la familio.

---

# HEF-sidejo



La nova politiko de la estraro estas diafane klara: ĝi volas ricevi kiel eble plej altan rendimento de sia oficejo, kaj, tiusence, ĝi faris ĉion necesan cele al la modernigo de la lokalo.

Unue venis la vico al la ĝenerala aspekto de la ejo, kiu ricevis drastan pozitivan ŝanĝon. Due sekvis la instrumentaro, t.e. la rimedoj per kiuj oni laboros por atingi de la

celoj fiksitaj en la ĵus akceptita Strategia Plano de Hispana Esperanto Federacio.

Do, la Asocio aĉetis tre modernan komputilon, kiu, kune kun la telefono, la aŭtomata respondilo kaj la faksilo, permesos ne nur rapidan komunikon inter la estraranoj, la membroj kaj la Asocio, kaj inter tiu kaj la inform-agentaĵoj, sed ankaŭ pli racian kaj kompletan administradon.

Cetere, la CO (Centra Oficejo), kiel oni kutime nomas la HEF-sidejon, fariĝas, almenaŭ provizore, ankaŭ la sidejo de la Esperanta Nacia Biblioteko. Rimarkindas, ke pluraj centoj da volumoj estas jam ordigitaj kaj katalogitaj pere de la nova komputilo.

La lokalo ne tro grandas, sed ĝi montriĝas ankoraŭ sufiĉa por la administraj bezonoj de HEF, kaj aldone por instruado de la lingvo. Fakte, tiu dua flanko en la uzado de la ejo povus liveri jen parton, jen la tuton de la mon-rimedoj necesaj por ĝia plena funkciado.

La hejmo de la hispana Esperanto-movado estas en Rodriguez de San Pedro 13, 3<sup>o</sup>, p-7, en Madrido, kaj, kompreneble, ĉiu membro estas de nun invitita koni la sidejon de sia Asocio, t. e. HEF.

**HEF: 91-4468079**  
**je via dispono 24 horojn en la tago**

# Kaj la ceter' - nur literaturo

Ne nur la Estraro de Hispana Esperanto-Federacio kunsidis en Madrido, sed ankaŭ kelkaj literaturemuloj nuntempe engaĝitaj en la vivo de la Asocio.

La dimanĉon matene, en vetero bela kaj amika etoso, Georgo Kamaĉo, Miguel Fernández, Antonio Valén kaj Liven Dek fordonis sin tuj en korpo kaj animo al la korektado de la manuskripto de la verko *Ibere libere*, baldaŭ aperonta sub la ŝildo de la eldonejo *Pro Esperanto* (Vieno), en kunlaboro kun la fondaĵo de HEF, *Fundación Esperanto* (Zaragozo). Kompreneble, sentiĝis la manko de unu el la verkistoj, Gonçalo Neves, kiu tamen kunestis spirite.

En Madrido, la beletristoj parolis ĉefe pri projektoj, multaj projektoj. Ŝajnas, ke la esperanta literaturo ĝuas favoran tempon en nia duoninsulo. Gonçalo, Georgo, Liven kaj Miguel jam preparas sian duan

komunan verkon. Temos pri proza verko. Sed, fakte, pli aktualas alia novaĵoj. Dum la libro de Kamaĉo "*Sur la linio*" daŭre ricevas laŭdojn en ĉiuj kontinentoj, la revuo *Forumo* preparas numeron dediĉitan al la nunaj iberiaj talentuloj.

Eĉ la tagmanĝo, trankvile gustumita en restoracio de la strato *Atocha*, estis abunde spicita de lingvo, stilo, formo. Kiel vi verkas? Kial vi ŝanĝis vian stilon? Ĉu ni traduku...? Kiam...?

Kaj poste ek al trinkejo por frandi tason da kafo, kaj revii iomete plu. Jes, ni ĉiuj dezirus viziti la majstron, la solan kiun ni konas: Fernando de Diego. Iam lia hispana-esperanta "vortarego", kiel diras Valén, pretos, kaj ni ricevos de li ĉi oran donacon. Revoj, mevoj, revoj...

*Dien Velk*

*Prezidanto de la  
Hispana Esperanto-Federacio  
klariganta al la amas-komunikiloj  
la 16 regulojn de Esperanto*





# Umberto Eco kaj Esperanto

La prestiĝa itala profesoro kaj grava verkisto Umberto Eco, partoprenis en Internacia Semiotika Kongreso okazinta en la Universitato de A Coruña (Galegio)\* je la komenco de decembro-92. En diskurso je la fermo de la Kongreso li opiniis, ke "Esperanto devus iĝi vehikla lingvo tutmonda".

La granda sentiveco ekzistanta en Hispanio pri la bezono de internacia lingvo por la interpopolaj rilatoj kaj la elstara personeco intelekta de Eco donis al tiu publika deklaro resonancojn tute neatenditajn, kaj la plej gravaj ĵurnaloj en la tuta lando dediĉis tutajn paĝojn por komenti la paroladon de la eminenta homo.

La ĵurnalo plej grava de Galegio, "La Voz de Galicia" (Voĉo de Galegio) 6-12-92 skribis: "Umberto Eco petas politikan apogon por la disvastigo de Esperanto. Eco konsideras, ke Esperanto povus iĝi tutmonda vehikla lingvo se ĝi disponus politikan apogon.

La aŭtoro de "La nomo de la rozo" konsideras reciproke eblaj la ekziston de universala lingvo kun la gardado de lingvo-multeco. La piamonta verkisto fermis hieraŭ en la Universitato de A Coruña la 5-an Kongreson pri Semiotiko, pere de referaĵo pri la "Jakoba Vojo kaj la Eŭropaj lingvoj" (\*\*).

La ĵurnalo "Faro de Vigo" (Lumturo de Vigo) publikigis samdate jenan tekston: "Umberto Eco defendas en A Coruña la uzadon de Esperanto. Li pledis pri ties uzado estiel universala lingvo, kaj pri instruado al geinfanoj. Li asertis, ke necesas enkonduki vehiklan lingvon, kian Esperanton, kaj kritikis neekziston de politika decido, por ke tio iĝu ebla. Pere de la referaĵo "La Jakoba Vojo kaj la Eŭropaj lingvoj" li reliefigis la influadon de la Vojo al kontaktado de lingvoj kaj kulturoj, kaj tion citis kiel ekzemplon por starigo de universala lingvo".



"Diario de Galicia" (jurnalo de Galegio) en sama dato aperigis jenan tekston: *"En la 5-a Internacia Kongreso pri Semiotiko, Umberto Eco pledas por instruado de Esperanto estiel universala lingvo. Li montriĝis partiano de ties instruado en fruaj aĝoj, tiel ke ĝi iĝu vehikla lingvo kaj priinsistis, ke tio ne implicas forgesadon de la multoblaj lingvoj ekzistantaj en la mondo"*.

La sekvanta tago (7.12.92) "La Voĉo de Galegio" denove informis: *"Umberto Eco vizitis Santiagon de Compostela, la Konsilejon pri Instituciaj Rilatoj kaj la rektoron de la Universitato. Li substrekis sian defendon de Esperanto estiel universala lingvo"*.

Kiel niaj legantoj scias, Antonio Alonso Núñez, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio loĝas en Santiago de Compostela. Okaze de la supre citita vizito de Umberto Eco al tiu urbo la HEF-prezidanto estis bonŝanca paroli kun la eminenta profesoro dum kelkaj minutoj. Jen resumo de tiu konversacio en la hispana lingvo:

**Alonso:** "Nome de Hispana Esperanto-Federacio —kies prezidanto mi estas— mi salutas vin, kaj ĝojas ke de via aŭtoritata situacio vi opinias prava kaj socie utila la ekziston de Esperanto kaj uzadon de ĝi".

**Prof. Eco:** *"Mi ripetas mian opinion hieraŭ publike eldiritan, ke Esperanto devas ludi gravan rolon, utilan rekte per si mem, kaj ankaŭ protekte al ĉiuj aliaj lingvoj"*.

**Alonso:** "Laŭ mia kompreno, tamen, en via referaĵo mankas la konstato, ke sen antaŭa universitata apogo en adekvata nombro da landoj, estas apenaŭ espereble, ke politikistoj povos meti la apogon, kiun vi petas. Universitatoj kaj similaj institucioj devas prepari la grundon al tiu apogo, laŭ vojo kaj plano, kiun nun ni ne havas tempon malvolvi".

**Prof. Eco** (Post duon-sekunda pripensio): *"Nu, jes, tion oni devus prikonsideri"*.

**Alonso:** "Por ekzemplo, mi jam dek jarojn instruas libervolan kurson pri Esperanto al universitataj studentoj; jam venis pli ol 240 personoj, kio pruvas ke ekzistas socia interesiĝo. Kaj mi nun baraktas -jam en malesperomunti same libervolan internacian preuniversitatan kurson pri diversaj fakoj en E. Sed ĉiama nivelo de libervoleco kaj ne-oficialeco trudas, ke la gelernantoj devas aŭ jen forlasi la aferon, aŭ jen veni al esperantistaj asocioj, kaj tie same libervole elspezi monon, tempon, laboron, kun apenaŭa espero -fakte, kun nula espero- ke la institucioj iam ajn faros decidan oficialan paŝon. Nu, tia vojo estas fakte senelira".

**Prof. Eco:** *"Jes, oni devas eltrovi pli efikan kaj firman vojon. El mia propra sperto, mi rakontu al vi, ke en miaj oftaj vojaĝoj al multaj landoj, ĉefe al Francio kaj Germanio, mi konstante aŭdas plendojn, ke la angla jam transpasis la rolon de vehikla lingvo, kaj iĝis imperiisma danĝero al la naciaj lingvoj, kiuj ekperdas terenon antaŭ ĝi. Kaj mi diras al ili: "La afero estas simpla, ekinstruu Esperanton al viaj geinfanoj, kaj la danĝero malaperos". Sed tion ŝajne ili ne volas".*

(Profesoro Paz Gago, la organizinto de la Kongreso pri Semiotiko, intervenis en tiu momento en nia konversacio): *"Jes, la francoj ne volas Esperanton, ĉar ili plu volas pri revenigo en antaŭan situacion, kun favora pozicio de la franca lingvo".*

**Alonso:** "Ni ĉiuj tion scias, sed oni komprenu, ke la dilemo estas, aŭ anglan, aŭ Esperanton.

Kaj nin multe ĉagrenas la tre ofta -implicita aŭ eksplicita- sinteno, ke multaj personoj opinias la uzantojn de Esperanto jen iaj sektanoj, jen nekleraj homoj, malrespektantaj la etnajn lingvojn, ktp. Kompreneble, ja esceptoj ekzistas (kvankam pli ofte ĉe persona nivelo, ol institucie). Sed ĝenerale la etoso ne estas tre favora al la interlingva ideo. Kaj laŭ psikologia vidpunkto eble estas komprenebla la fakto, ke la plej forta kontraŭstaro troviĝas ĉe homoj, kiuj malsukcesis pri la ellernado de lingvoj (tute specife, pri la angla), aŭ jen ĉe tiuj, kiuj iel perlaboras sian panon pere de lingvokonaj".

**Prof. Eco:** *"Jes, mi ĝenerale konsentas. Estas tamen vero, ke inter la multaj leteroj, kiujn mi ricevas pri Esperanto, kelkaj estas vere sektecaj, kaj ili kvazaŭ volas trudi al mi, kion mi devas pensi kaj kion mi devas diri pri la afero".*

**Alonso:** "Mi konsentas, ke iuj tiaj kazoj ja povas ekzisti. Sed evidente, ankaŭ la reciproka sinteno troviĝas, kaj analogaj situacioj ekzistas en ĉiuj fakoj de la vivo, do tio estas areto pri kiu ni ĉiuj devas antaŭkalkuli".

**Prof. Eco:** *Ja jes. Ja tio ne malhelpas, ke mi scias la valoron de Esperanto, kaj ke kvankam mi ne estas "samideano", mi tamen apogas ĝin.*

**Alonso:** Fine, mi pensas utila, ke se vi tion trovas akceptebla, okazu diskonigo de viaj pensoj, sinteno kaj opinio pri la bezonata vehikla interlingvo, pere de la Esperanto-organizaĵoj. Kaj por tia tasko vi jam antaŭscias, ke ni restas tute je via dispono kaj, ke mi opinias, ke la bezonataj priparoloj okazu tra Itala Esperanto-Federacio.

**Prof. Eco:** *"Mi pensas, ke tio estus ebla".*

**Alonso:** "Elkoran dankon por via atento al mi, kaj mi deziras al vi feliĉan restadon en nia urbo, ankaŭ meze de tiuj ĉi diluvegaj tagoj, vere tipaj de la galega klimato.

Tiun kvinminutan interparolon ĉeestis pluraj gravuloj. Mi esperas, ke mi povos plue paroli kun ili pri la afero, kaj pri tio mi oportune informos.

*Laŭ informo de Antonio Alonso Núñez*

(\*) **Galegio:** Unu el la 17 Aŭtonomaj Komunumoj de Hispanio. Ĝi situas nord-okcidente de la lando.

(\*\*) **Jakoba Vojo:** Fama mezepoka pilgrimvojo de Centra Eŭropo ĝis la (supozata) tombo de la apostolo Jakobo Zebedea en Santiago de Compostela, tra kiu okazis grandaj religiaj kaj kulturaj influoj. (Santiago = Sant'iago = Sant'jago = Sankta Jakobo).

**N. de la R.**

Krom la galegaj ĵurnaloj indikitaj de la prezidanto Alonso, ankaŭ la plej gravaj periodaĵoj el Hispanio informis pri la parolado de Prof. Eco en la Universitato de A Coruña kaj liaj favoraj opinioj pri Esperanto.

"El Pafs", eble la plej grava ĵurnalo en nia lando, aperigis la 6-an de decembro ampleksan dupaĝan intervjuon al prof. Eco pri "Traktato de Maastricht, nacia identeco, lingvoj kaj urboj". En ĝi la eminenta profesoro konfirmas sian opinion pri bezono de vehikla lingvo en Eŭropo kaj mencias Esperanton kiel la plej trafan tiucele.

---

# 78<sup>A</sup> UK DE ESPERANTO EN VALENCIO

**24-31 julio 1993**

**Kongresa komuniko 1.**

Konstanta adreso: 78-a UK, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK: 78-a UK, Gran Vía Fernando el Católico, 45a, E-46008. Valencia (Hispanio).

**Atentu NE uzi la adreson de la ĉefdelegito de UEA!**

**Kongresa temo:** "Klerigo por la 21-a jarcento". En nia decembra numero aperos enkonduke artikolo de la ĝenerala direktoro de UNESKO, Federico Mayor Zaragoza.

**Aliĝoj:** Ĝis la komenco de novembro aliĝis pli ol 200 personoj el 35 landoj. Aliĝilo estis sendita kun la septembra numero de "Esperanto" kaj kun la n-ro 308 Novbro-Decbro 1992 de "Boletín". Eblas mendi pliajn ekzemplerojn.

**Kongresejo:** La scenejo de la 78-a UK estos eleganta muzika aŭditorio, populare nomata "El Palau". Bela sukceso de la arkitekturo, kombinanta betonon kaj vitron, ĝi montriĝas maksimume taŭga kaj komforta por la uzantoj. La kongresejo estas facile atingebla de ĉiuj urbopartoj.

**Loĝado:** La oferto kovras vastan gamon: de tre komfortaj hoteloj ĝis agrablaj mezkategoriaj hoteloj kun modestaj prezoj kaj studentaj loĝejoj de tri prez- kaj kvalit-niveletoj. Inter ĉi lastaj oni ofertas ankaŭ kompletan pensionon, t.e., kun tri manĝoj tage. (Notindas, ke en Valencio la kongreso laboros kun longa tagmeza paŭzo, kiu sufiĉos por manĝo kaj ripozosiesto). Ĉiuj hoteloj kaj studentejoj estas je promen-distanco de la kongresejo aŭ bone konektitaj per publikaj transportiloj.

**Amasloĝejoj:** TEJO kaj LKK funkcigos ĝin por gejunuloj kaj klopodos organizi tie specialajn -ĉefe dumnoktajn- programerojn por ili. Ni serĉas eblon organizi amasloĝejon ankaŭ por aliaj kongresanoj.

**Ekskursoj:** Okazos pluraj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj, inkluzive de simplaj plaĝvizitoj al la apudaj, logaj

strandoj. Kelkaj tri- ĝis sep-tagaj ekskursoj tuj post la kongreso kondukos kongresanojn en la proksimajn regionojn kaj tra la tuta lando.

**Oficiala antaŭkongreso** okazos en Barcelono inter la 20-a kaj 23-a de julio. Oni vizitos la ĉefajn vidindaĵojn de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo, i.a. la Olimpikan Vilaĝon. Barcelona E-Centro jam aperigis E-lingvajn biletojn de la nacia loterio por reklami la eventon. Samloke LF-Koop. kaj Kataluna E-Asocio aranĝos, de la 17-a ĝis la 22-a de julio, la 12-an Internacian Literaturan Forumon pri "Literatura kritiko kaj recenz-arto".

**Postkongresoj:** Kadre de la 5-6-taga Oficiala Postkongreso oni buse vizitos Madridon, kie -krom la trezoraj vidindaĵoj de la urbo- atendos lokaj esperantistoj kun specialaj aranĝoj. Alia postkongreso celos pli suden, al la historiaj urboj de Kastilio kaj Andaluzio: Toledo, Granado, Sevilo, Murcio (detaloj aperos en la Dua Bulteno).



**Ferioj:** Hispanio estas ĉiujare ripozejo kaj amuziĝejo por milionoj da turistoj. Tial ankaŭ ni ofertas ferian ekskurson, kun loĝado kaj manĝoj en iu fiksa loko, banado kaj sunumado.

Tia ekskurso estos tre taŭga por homoj kiuj vere ŝatas ripozi kun aliaj esperantistoj sen strikta programo.

**Internacia Kongresa Universitato:** En Valencio okazos la 46-a sesio de IKU. Universitataj lekciistoj aŭ simile kvalifikitaj personoj povas proponi prelegon al la Komisiono pri IKU (ĉe la konstanta adreso en Roterdamo). Ili sendu foton de pasporta formato, maks. 200-vortan prelegresumon, plus biografion kaj bibliografion kun simila longeco. Prelegontoj devas mem aliĝi al la kongreso. Ili ricevos honorarion de 185 gld aŭ, se ili liveros kompletan tekston de sia prelego, de 370 gld, sed ne repagon de kostoj. Aparte bonvenas junaj kandidatoj kaj homoj ankoraŭ ne prelegintaj en UK. Limdato po kandidatiĝoj: fino de januaro.

**Specialaĵo:** Bankedo por ĉiuj! Paeljo (paella), speciala plado de Hispanio kaj ĉefe de Valencio, estos senpage proponita al ĉiuj partoprenantoj de la Interkona Vespero. Temas pri spektaklo en si mem, ĉar la giganta paeljo prepariĝos en unu sola pato por ĉiuj kongresanoj!

**Konfirmilo-invitletero:** la kongresa konfirmilo ŝanĝos sian tradician aspekton por plenumi ankaŭ la funkcion de invitletero. Aliĝintaj kongresanoj (kaj nur ili) ricevos, krom la kutima Esperanta teksto, nacilingvan konfirmon de sia aliĝo, kiu utilos por akiri hispanan vizon.

**Artistoj:** Ni invitas diversĝenrajn artistojn kontribui al la planata riĉa kultura kaj arta programo de la kongreso. Ili sendu sian kandidatiĝon al la CO ĝis la fino de januaro 1993.

**Unua Bulteno:** Interesitoj povas laŭpete ricevi pluajn ekzemplerojn.

**Dua Bulteno** aperos en januaro. Kiel kutime, ĝi enhavos plenan ofertan hoteloj kaj ekskursoj kaj aliajn detalajn informojn.

**Glumarko de la Valencio UK** populariĝis jam en Vieno. En ĝi lerte kuniĝas la ĉefaj simboloj de Valencio: freŝkolora oranĝo kun la verda stelo, sur la ondoj de lazure blua Mediteraneo. Vi povas mendi ĝin po dekoj, kontraŭ 3,90 gld por ĉiu deko (+ sendokostoj).

**49-a Internacia Junulara Kongreso** okazos post la UK, de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto en Vraca, historia urbo de nordokcidenta Bulgario. En tiu lando la kongresa temo sonas aparte aktuala: "Ekonomio kaj socio en ŝanĝiĝo". La kotizoj inkluzivas programon, loĝadon kaj manĝojn, kaj varias laŭ la datoj de aliĝo kaj laŭ aĝo. Ĝis la jarfino: inter 100 kaj 170 usonaj dolaroj. La LKK serĉas kontaktojn kun la partoprenintoj de la 19-a IJK (Vraca, 1963) kaj petas ilin anonci sian adreson al: Bojĉo Mladenov, p.k. 66, BG-3000 Vraca. Aliĝilo kaj unua bulteno ricevebla ĉe la LKK (p.k. 26, BG-3000 Vraca) aŭ ĉe la CO.

### Pardon-peto

La LKK petas pardonon pro la ĝenoj kaŭzitaj al la Ĉefdelegito de UEA kaj al ĉiuj samideanoj, kiuj sendis monon al li, okaze de konfuza informo aperinta en Boletĥn.

# FORPISIS D-RO JOSÉ OLAVIDE



Komence de oktobro forpasis D-ro José Olavide, profesia psikiatro kaj absolute unika individueco. Li fakte apenaŭ estis konata ekster la Zaragoza rondo, kvankam li naskiĝis en Madrido kaj ja sentis sin madridano de la verto ĝis la plandoj. Homo iom seka en siaj sociaj rilatoj kaj enkore iomete timida, lia ĉefa kaj konstanta trajto estis amo al libroj sub ĉiuj prezentoj, eble rande de konvulsia kolektiĝemo, kiel li iam konfesis. Tiun adoron li manifestis ĉiam kaj ĉie dum longaj babiladoj pri literaturo -ĉefe pri la Esperanta- ege riĉigaj por kunparolantoj. Lia profunda kono de la Esperanta beletro surbaze de solida kulturo kaj amasa libro-voro povis bone rivali tiun de la plej

elstaraj modernaj kritikistoj kaj esperantologoj, sed lia natura retiriĝemo kaj eble ankaŭ manko de eksteraj instigoj iel malkongruis kun publika eldonado de untaj studoj. Ja ĉiu homo elektas sian vojon.

Bone rimarku, ke Olavide posedis ĉirkaŭ 10.000 librojn, el kiuj 2.000 (t.e. duoble ol la Aragona klubo *Frateco*), Esperantaj. Tre verŝajne, temis pri la plej granda privata kolekto de Esperanto-libroj en nia lando kaj, same probable, ili iĝos parto de la Frateca biblioteko iam baldaŭ.

Ĝisosta esperantisto (en la favora senco de l'vorto!) kaj senmanka Esperanto-parolanto, li kurioze ĉiam preferis krokodiladon sub ekskuzo de pli grandaj komprenebleco kaj esprimivo. Komprenu tion kiel unu plian trajton de lia forta personeco.

Nia omaĝo al tiu neforgesebla libro-amanto kaj instruisto de instruistoj estu sekvi kiel eble liajn ĉiamajn tri konsilojn por fariĝi bona esperantisto: "Leer, leer y leer".


LA REDAKCIO

---

## LIBROSERVO

Nun ankaŭ telefone!

983-260086 (Kun aŭtomata respondilo)



# 100 JAROJ JAM SUFIĈAS

La subskribinto bone scias kaj konscias, ke li ne estas perfekta esperantisto, laŭ gramatika vidpunkto; tial li venas ĉi tien por instrui neniun. Sed la subskribinto ankaŭ scias kaj konscias, ke multaj el la kleraj, inteligentaj kaj gvidantaj kapoj de la Esperanta Gramatiko, kreas konfuzon kaj malfavorajn opiniojn pri nia kara lingvo.

Unue restu klare, ke ĉi tiujn kritikojn mi adresas al neniuj konkreta esperantisto, sed jes al saĝularo de la lingvo, kiu regas la nunon kaj estontecon de Esperanto. Al tiuj eternaj diskutantoj pri gramatikaĵoj.

Gesinjoroj, jam sufiĉas! Esperanto estas jam centjara kaj dum ĉi tiuj cent jaroj la disputoj kaj diskutoj pri Esperanto estis konstantaj (aŭ almenaŭ dum la lastaj tridek jaroj, kiujn mi konas).

La Esperantaj gazetoj metas tre ofte, kiel frontajn artikolojn, la eternan diskutadon pri diversaj gramatikaj temoj. En Kongresoj, renkontiĝoj kaj aliaj esperantistaj rendevuoj, la precipa temo preskaŭ ĉiam estas tiu rilata al la Esperanta gramatiko. Antaŭ tiu situacio, nepre oni devas diri: sufiĉas! Ĉu cent jaroj ne sufiĉis por kompreno de la lingvo? Ĉu eterne ni daŭrigos tiun diskutadon? Ĉu vi pensas, ke ĉi tiu "batalo" pri la Esperanta gramatiko favoras nian movadon? Ĉu vi pensas, ke iu registaro povas akcepti Esperanton kiel oficialan lingvon, meze de ĉi tiu ĥaosa diskutado? Absolute ne!



Ofte ŝajnas kvazaŭ la lingvo Esperanto estus la lingvo de la konfuzo aŭ konfuziga lingvo. Al tiu senbrida prigramatika diskutado aldoniĝas la amantoj de neologismoj, la reformistoj pri skribado de la lingvo, la reformistoj laŭ gramatika vidpunkto, kaj tiuj, kiuj surbaze de Esperanto anoncas la naskiĝon de nova lingvo. Nu, kion oni devas fari? Sendube oni devus starigi rondan tablon, kun ĉeesto de la "pensantaj kapoj" kaj atingi interkonsenton surbaze de la ekzistanta leĝaro, tio estas la dek ses reguloj de la Esperanta gramatiko. Ĉu tio estas tiom malfacila? Kion mi ja opinias malfacila, estas la propraj personaj opinioj, kiujn neniun deziras rezigni. La konkretaj gramatikaj vidpunktoj tre ofte restas en la dua vico. Mi ripetas, ke mi aludas neniun konkretan esperantiston, sed jes tiun eliton de nia gvidantaro en la gramatikaj temoj.

Cent jaroj estas ja multe da jaroj. Ni ne povas iri sur tiu vojo, aŭ ni mem fosos nian tombon.


Ni ne mortigu la kokinion de la oraj ovoĵ!

*Luis Serrano Pérez*

---

## Atenta eldonistoj!

Librojn por recenzo la eldonejoj kaj privataj eldonistoj sendu al ni po du ekzempleroj. Unu por la recenzisto kaj alia por la Esperanta Nacia Biblioteko ĵus kreita en Madrido.



# LIBROSERVO

## 983-260086

telefona aŭtomata respondilo





## Badajoz

Estas rimarkinda ĉi-jare, same kiel en antaŭaj lernojaroj, la instruata tasko de ILEI en Badajoz, kie s-ro José González kunvokis pasintnovembre okaze de inaŭguro de Esperanto-kursoj 73 enskribitajn gelemantojn de la Ekstremadura Universitato.

Januare komenciĝos la 2-a nivelo de novaj Esperanto-kursoj. HEF gratulas nian samideanon J. González pro tiu meritoplana laboro.

## Barcelono

Barcelona Esperanto-Centro, organizanto de la Antaŭkongreso de la 78-a UK de Esperanto elektis jenan OKK:

Prezidanto:

Salvador Aragay Galbany.

Gesekretarioj:

Anna Cardo kaj Manuel López.

Kasisto:

Juan José Martínez.

Voĉdonantoj:

Luis M<sup>a</sup> Hernández Izal (Vizito de Hispana E-Muzeo). José M<sup>a</sup> Galofré, de KAE (Vizito de Sabadell). Trinitat García, de E-Grupo J. Anglés (Vizito de Sant Cugat). Adam Sudec kaj J. Miranda (Video-konkurso). Francesc Màs kaj Jordi Ferré (Fotoj). Giordano Moya, de Terrassa (Prelego). Josep Climent kaj Martí Guerrero (Kulturaj Aferoj).

Informoj pri la Antaŭkongreso oni povas peti de: Barcelona Esperanto-Centro, Carreras i Candi, 34-36. E-08028-Barcelona (Hispanio).

## Baugé

La Kultura Esperanto-Domo ĉe Kastelo Grésillon anoncas por 1993:

- Kursojn diversgradajn.
- Prelegojn diverstemajn.
- Distraĵojn diversajn.
- Ekskursojn en belega regiono.

Ĝi disponigas al la restadontoj:

- Kurso-ĉambrojn.
- Riĉan bibliotekon.
- Bonan libro-servon.
- Salonojn, butikojn.

Petu informojn aŭ la programon por 1993 al: Esperanto-Domo; Inform-Servo, 17, rue Cesar Frank, F-44240-La Chapelle-sur-Erdre. Francio.

## REUS

Kun ĝojo ni ricevis la novaĵon, ke la ĵurio de la beletra konkurso "Blanka Kolombo" de Bulgara Esperanto-

Asocio aljuĝis la premiojn pri eseoj kaj poezio al nia kolego kaj kunlaboranto Salvador Gumà Clavell.

Okaze de tiu sukceso, la loka ĵurnalo "La Voĉo de Reus" intervjuis al nia bona amiko Salvador Gumà pri la temo Esperanto, aperigis lian foton kaj plenigis tutan paĝon emfazante la beletrajn meritojn de tiu ĉi eminenta Reusano kaj la rolon de Esperanto por kulturaj taskoj.

La Redakcio de "Boletín" gratulas nian kolegon Salvador GUMA pro tiu rimarkinda beletra sukceso.

## Madrido

De la 27-a ĝis la 29-a de novembro 1992 okazis en la hispana ĉefurbo Monda Kongreso pri Spiritismo. Unu el la programeroj estis "Esperanto en la disvastigo de Spiritismo", pritraktita de s-ro Rafael González Medina, prezidanto de Hispana Spiritisma Federacio kaj lernanto de nia kolego Fernando Moral. Laŭlonge de la prelego s-ro González Medina priskribis la rilatojn de spiritismo en esperantistaj medioj, kaj komentis la abundan bibliografion ekzistantan pri spiritismo en Esperanto.

La prelego vekis la intereson de la ĉeestantaro pri Esperanto, kaj multaj el ili petis informon pri urboj kaj lokoj por lerni Esperanton.

## La Zamenhofa Festo

Al nia Redaktejo venis raportoj de preskaŭ ĉiuj gravaj hispanaj esperantistaj Grupoj pri la tiutaga festado. Rimarkindaj tiuj okazintaj en Sabadell, Zaragozo, Madrido, Valencio,

Barcelono, Santander, k.a.. Gravas, ke tiu

Festo restu inter la kutimoj tradiciaj de niaj Grupoj!

## Sant Cugat del Vallès

Organizite de Hispana Esperanta Fervojista Asocio okazos de la 9-a ĝis la 16-a de oktobro 1993 la 1-a Internacia Kultura kaj Turisma Semajno en Sant Cugat del Vallès (Barcelono). Tre interesa programo jam estas pretigita. Interesatoj bonvolu peti informojn al: Hispana Esperanta Fervojista Asocio; Poŝtkesto 15027; 08080-BARCELONA. Hispanio.

## EL POPOLA ĈINIO

Komenciĝas nova abon-varba kampanjo 1993 por "El Popola Ĉinio". Ĝi prezentas interesajn artikolojn kaj belajn bildojn; raportas pri Ĉinio kaj ĝia movado. Certe leginda revuo.

Tiu, kiu abonas aŭ reabonas EPĈ en la kampanjo ĝis 28-2-93 ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al s-ro Félix Gómez Martín; C/Corbeta, 8.-5º. 28042-MADRID, kune kun la abontarifo, prefere per poŝtmandato (Bv. ne sendi bankĉekon).

# Helenistika artefarita lingvo



Ĉiu filozofiemulo scias, ke la Helenoj jam inventis preskaŭ ĉiun filozofian skolon; kurioze, iu el ili kreis ankaŭ artefaritan lingvon en la 4-a jarcento a.K.

Alesarko estis filo de Antipatro (generalo de Filipo de Makedonio kaj de Aleksandro la Granda) kaj frato de Kasandro, reĝo de Makedonio. Laŭ la antikvaj aŭtoroj, li estis grammatik, t.e., filologo. Li fondis urbon, kiun li nomis *Uranopolis*, kio signifas Ĉielurbo, en la Ĥalkidika Duoninsulo (nordoriente de la aktuala Grekio), sufiĉe granda, ĉar ĝi estis 30-stadia je perimetro. (Stadio estis mezurunuo, egala al proksimume 180 metroj; do, la perimetro de Ĉielurbo estis 5400 metrojn longa).

Pri Aleksarko ni ricevis du pliajn noticojn el skribaj fontoj: la unuan ke li kutime vestiĝis kiel la suna dio Helio; la dua, ke li kreis artefaritan lingvon.

Antaŭ ol priskribi tian lingvon, ni ekzamenu, ĉu ĉi tiuj noticoj estas kredindaj. Arkeologoj trovis

arĝentajn monerojn de tiu urbo (bedaŭrinde, ili ne trovis la urbon), sed ili pravas, ke Ĉielurbo ekzistis vere, kaj ne nur en la kapo de la verkistoj. Fakte, ĉi tiuj moneroj ne estas normalaj, ĉar:

- la pezo ne estas la kutima,
- sur ili oni ne legas

*Ouranopoliton* (monero de la Ĉielurbanoj), kiel estus supozeble, sed *Ouranidon* (monero de la idoj de Urano \*).

Pri Alesarko, oni ne scias, ĉu li estis skizofreniulo aŭ nur idealisto, kiu volis krei ĉielurbon pli perfektan kaj proksiman al la dioj. Sed tio vere ne gravas, se ni volas scii, kial li kreis artefaritan lingvon aŭ kia ĝi estis.

Unue ni konsciu, ke la grekoj neniam pensis pri internaciaj lingvoj: se oni volis ion diri al iu barbaro (\*\*), oni ordinaro uzis la grekan. Tial, lingvo pli perfekta, pli proksima al la dioj, devis esti grekdevena. Multaj grekaj verkistoj montras, kiel diferencigi la lingvon homan disde la dia. La dioj parolis la saman lingvon (la grekan, kompreneble!), sed pli ekzakte, pli majeste: ili uzis vortojn poeziajn (aŭ poezidevenajn), foje kreitajn de la poeto; la homoj, kutimajn vortojn. La kontraŭeco *inter lingvo dia kaj lingvo homa* oni povas klarigi kiel kontraŭeco *inter lingvo greka klera kaj lingvo greka pleba*\*\*\*.

Alesarko uzis poeziajn ĉirkaŭfrazojn anstataŭ pli normalaj

vortoj. Ateneo (4), kiu mencias lian artefaritan lingvon, inter aliaj konservis jenajn vortojn:

—anstataŭ koko, *alektryón* en la greka, li uzis *orthrobóas*, kiu signifas la "aŭrorvokisto".

—*argyris*, kiu devenas de la greka vorto por arĝento, anstataŭ *drakhmé*, drakmo, arĝenta monero.

Ĉiujn ĉi vortojn kreis Aleksandro, inter aliaj. Ni ne scias, ĉu oni kutime uzis tiun lingvaĵon en Ĉielurbo, aŭ ĉu nur tiuj, kiuj volis flati la reĝon. Sed certe, ĉi tiu lingvaĵo havas ion komunan kun Esperanto kaj la aliaj planlingvoj (eĉ kiam la celoj ne samas): la konscia volo krei lingvon pli perfektan.

*José Fco. Martín del Pozo*

(\*) Urano estis praa greka dio de la ĉielo, patro de Krono kaj avo de Zeŭso.

(\*\*) Barbaro ne estis malestimiga vorto, sed onomatopea; al la grekoj, aliaj lingvoj sonis bar-bar-bar.

(\*\*\*) Ĉi tiun procedon oni uzis ankaŭ en la praaj islanda, irlanda, hitita kaj hindaj lingvoj.

(4) Ateneo estis greka verkisto de la 3-a jc. p.K., dank' al kiu ni konservas multajn anekdotojn kaj citaĵojn de pli antikvaj grekaj aŭtoroj.

## *Ĉu Interlingua estas pli facile lernebla ol Esperanto?*

En la enkonduko de sia libro pri Interlingua kaj Esperanto<sup>1</sup>, F.P. Gopsill, instruisto pri modernaj lingvoj en britaj mezgradaj lernejoj, priskribas sian sperton en la instruado de du planlingvoj, Esperanto kaj Interlingua, al siaj lernantoj. Li tiris la konkludon, ke "la lernantoj ŝajne pli facile alproprigis Interlingua-n ol Esperanton..." (pĝ.5).


Gopsill faris grandan malutilon al la pedagogia profesio, ĉar li ne provizis sian libron per kompleta dokumentaĵo pri sia sperto en la instruado de la koncernaj lingvoj. Anstataŭe, li verkis polvosekan polemikan pamfleton, celantan bagateligi la progreson atingitan de Esperanto kaj nigrigi d-ron Zamenhof kaj esperantistojn ĝenerale.

La aŭtoro aparte prisilentas la teknikojn, kiujn li uzis por mezuri la lerneblecon de Esperanto kaj Interlingua. Tiu ĉi manko de objektivaj donitaĵoj ja estas stranga, ĉar Gopsill fiere informas siajn legantojn, ke li posedas plurajn universitatajn gradojn, inter kiuj estas bakalaŭraj diplomoj pri edukado kaj sociaj sciencoj kaj magistra diplomo pri superaj edukaj kaj sociaj reserĉ-metodoj.

Kiom multe utilas tiom da erudicio supozeble reprezentita per tiuj diplomoj, se Gopsill faris neniun provon plani validan kaj konvinkan eksperimenton? Mankantaj estas ankaŭ informoj pri la antaŭa lingvoscio de la lernantoj, kiuj studis la planlingvojn; krom la angla, kiujn aliajn lingvojn ili sciis? Ĉu la sama grupo da lernantoj, kiu ricevis instruon pri Esperanto, poste studis Interlingua-n, aŭ ĉu du sendependaj kaj egale parigitaj grupoj estis instruitaj?

Ankoraŭ unu grava demando koncernas la kvanton da tempo, kiu estis bezonata de lernantoj studantaj ĉiun lingvon por akiri, unue, la pasivan kapablon kompreni skribajn tekstojn kaj la parolatan lingvon, kaj, poste, la aktivan kompetentecon esprimi sin skribe kaj parole. Advokatoj de Interlingua senhezite konfesas, ke ilia lingvo estas destinita primare por skriba komunikado, kaj ili malkaŝe deklaras, ke estas pli malfacile akiri parol-fluecon en Interlingua ol en Esperanto.

Instruantoj de Esperanto devas konscii pri la noca naturo de la libro de Gopsill, ĉar ĝi povas havi malfavoran efikon sur iliajn klopodojn enkonduki Esperanton en la lernejan instruplanon. Se la misformita prezentado, kiun Gopsill faris pri Esperanto kaj Interlingua ricevos la atenton de edukaj aŭtoritatoj, havantaj decidpovon pri la instruado de Esperanto en siaj lernejoj, povas esti ĝi jena demando: ĉu ne estus pli praktike instrui Interlingua-n, ĉar ĝi supozeble estas pli facile lernebla ol Esperanto? Se esperantistaj instruantoj alfrontos tian situacion, ili devas havi ĉemane donitaĵojn, montrantajn, ke la konkludo de Gopsill estas neapogebla, ĉar ĝi ne baziĝas sur zorge kontrolita kompara reserĉo de lingvolernado. Bedaŭrinde, nuntempe ili estas en neniuj pozicio kontraŭdiri la aserton de Gopsill. Esploro estis entreprenita por testi la relativan facilecon lerni Esperanton kompare kun etnaj lingvoj, sed ne kun rilato al Interlingua.



La motivado de lernejoj infanoj studi Esperanton aŭ Interlingua-n estas plej grava, kaj ĝi efikas sur la lernebleco de la lingvoj. Ĉi-rilate Esperanto havas decidan avantaĝon super Interlingua, ĉar ĝia tutmonda movado ebligas al junuloj partoprenon en riĉa vario de agadoj trans lingvaj limoj, kaj kondukas al kontaktoj kun membroj de diversaj kulturoj. Male, la

Interlingua-movado estas malfekunda dezerto, kie ne ekzistas eĉ publikigaĵoj konvenaj por junaj lernantoj.

La organizado de reserĉ-projekto esploranta la lerneblecon de Esperanto kaj Interlingua postulas urĝan konsideron de instruantoj de Esperanto. Morgaŭ povas esti tro malfrue, kiam la elekto eble estos farita surbaze de eldiroj de membroj de la Interlingua-movado kiel Gopsill.

Eble oni povas interesi universitatajn studentojn en diversaj landoj entrepreni esplorkonon por magistra aŭ doktora disertacio. La instruado de Esperanto kaj Interlingua devas esti farita de la plej kapablaj instruantoj de la respektivaj lingvoj, sed la testado kaj interpretado de la rezultoj nepre estu plenumitaj de personoj, kiuj estas membroj nek de la Esperanto- nek de la Interlingua-movado.

*Bernard GOLDEN*

**Noto (1):** *International languages -a matter for Interlingua* (Internaciaj lingvoj- afero por Interlingua): Sheffield, British Interlingua Society, 1990, 282 pĝ.

---

Nefermita letero

## **LA ESPERANTISMO KAJ ĜIA MESAĜO**

Ĝiatempe, la aŭtoro de Esperanto, D-ro Zamenhof, lanĉis sian projekton de Internacia Lingvo, por altruisme havigi al la homaro neŭtralan instrumenton de komunikado tutmonda, kun la celo, ke la homoj povu amike sin interkompreni, respektante ĉies karakterizaĵojn pri raso, nacieco, religio aŭ politika opinio, kiujn konceptojn poste adaptis al si UEA. Ja tiu homama celo, t.e., lia "Interna Ideo", moderne nomata "Humaneca Internaciismo", estis kaj plu estas la precipa forto, kiu konsistigas la motoron de Esperanto kaj ĝia Movado.


Ne estas do strange, ke ricevinte la intrigan periodaĵon "La Paroĥa Folio", eldonitan de la Esperanto-Rondeto de Burjassot (Valencio), ĝia legado ŝoke konsternis nin ĉiujn. Ja eĉ la plej maljunaj esperantistoj, longatempe disvastigantaj Esperanton ĉe ni, ne memoras tiom da ofendoj kaj maldecaj vortoj, kiom tiuj verŝitaj el la plumo de iuj esperantistoj kontraŭ noblaj samideanoj de nia Movado. El tiu pamfleto, organo de la Esperanto-

Rondeto de Burjassot, ni plukis kelkajn malĝentilaĵojn, kiujn jene ni komentarias:

Unualoke, ni demandas nin, kiun moralan aŭtoritatecon esperantistan havas tiuj supozeble junaj uloj, eventuale ne enskribitaj en UEA, por tiom krude ĉikani, inter aliaj, la organizantojn kaj simpatiantojn de la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Valencio? Tiu Burjassot-koterio krome deklaras, ke ĝi malkonsentas kaj plu ridindigos la aperadon de raportoj aŭ informoj pri inaŭguroj, prelegoj, kursoj, omaĝoj kaj aliaj eventoj rilataj al Esperanto; ja prave tiuj uloj nomas sin mem nenormalaj esperantistoj! -Ĉar ja la lingva nivelo de "La Paroĥa Folio" estas kelkloke konfuza, ni ne povas dedukti, kion ekzakte oni celas diri en iu nekrologa noto, subskribita per la sigloj K.A.E., kiuj estas tiuj de nia organizacio.

Estus interese, se la membroj de tiu Burjassot-a Rondeto prezentus siajn jam realigitajn servojn al la Esperanto-Movado, por kompari ilin kun tiuj de senkaŭze kritikataj esperantistoj, inter ili, samideanoj Aŭgusto Casquero kaj A.Marco Botella<sup>1</sup>, kies pozitiva tasko estas longatempe palpebla en la Esperantisma kampo nialanda.

Aparte de tiu ofenda moka teniĝo de la Burjassot-aj esperantistoj kontraŭ



fervoraj aktivantaj samideanoj, la organizacio KAE same bedaŭras -ĉar tio iel kompromitas la Esperanto-Movadon- la malĝentilaĵojn kaj insultojn, per kiuj la esperantistoj de la Burjassot-a Rondeto malkaŝe atakas, krom determinita konfeso kaj ĝiaj membroj, ankaŭ demokrate elektitajn aŭtoritatulojn en Hispanujo, nome ĝian ŝtatestron kaj du liajn ministrojn, kiujn publike ili nomas: firabistoj, fisubpremantoj, fimensogistoj kaj fifaŝistoj... Tiu rozario da insultoj, ornamita per neprezenteblaj pornografaj sekso-bildoj, atencantaj la moralon de ĉiu prudenta persono, fakte konsistigas la tute negativan laboron de tiu Burjassot-a Rondeto, kiu krome anoncas plu daŭrigi sian kontraŭ-Esperantisman kampanjon, opozicie al la organizado kaj organizantoj de la Universala Esperanto-Kongreso, okazonta en

Valencio. Sen pliaj komentarioj!

Konklude, ni petas, kaj por la bona nomo de la Esperantismo tion ni forte deziras, ke la Grupo Esperanto-Rondeto bonvole rekonsideru siajn nerespektajn konceptojn esprimitajn en sia organo "La Paroĥa Folio", kaj

ekde nun ĝiaj membroj eksklude dediĉu sin disvastigi Esperanton kaj ĝian humanisman mesaĝon, per kiu kultura tasko prioritare devas strebi ĉiu Esperanto-klubo.

Nome de "Kultura Asocio Esperantista" (KAE), subskribas ĝia prezidanto:

*José M<sup>a</sup> Galofré Domingo*

(1) Ne temas pri la redaktoro de "Boletín", sed pri juna zaragozano —Marco Esteban— nun loĝanta en Valencio.

## Surogataj argumentoj


- En kiu lingvo vi parolis telefone antaŭ kelkaj minutoj? - iu demandas nacilingve.

- En esperanto.

- Ha jes!, esperanto, la *surogata* lingvo...

Kiam oni deziras ataki esperanton senscie, estas mode uzi vortojn kiel *artefarita, malnatura, maŝina, malviva, arbitra* kaj similaj. De nun malamikoj de esperanto disponas plian atakilon: *surogata*.

Nomi esperanton *surogata* estas same prava, kiel nomi ĝin *malviva*. Ne temas pri eldiro de konstato, sed pri vortigo de antaŭjuĝo. Esperantistoj, kutime pretendaj je maldogmemo kaj toleremo, devas protesti kontraŭ tiaj senbazaj antaŭjuĝoj, ankaŭ kiam temas pri asertoj de aliaj esperantistoj pri kiu ajn temo.



Tial mi protestas nun kontraŭ tiuj, kiuj nomas la jubilean simbolon *surogata*. Se ili legus la difinon de tiu vorto en PIV, ili trovus, ke *surogato* estas *produkto, kiun oni povas uzi anstataŭ iu alia, ĉar ĝi posedas proksimume la samajn ecojn sed estas pli malkara*. Alivorte, nek la lingvon esperanto nek la

jubilean simbolon oni povas nomi surogataj, ĉar ilia celo ne estas anstataŭi respektive la naciajn lingvojn aŭ la verdan stelon.

Se tiuj samaj sinjoroj legus la artikolon *Insigno* en *Enciklopedio de Esperanto*, ili eksciis, ke la prototipo de insigno estis ora stelo sur verda kampo, kaj ke la unua, kiu ĵetis la ideon pri verda koloro kaj pri (komence senkolora) stelo, estis L. de Beaufront (unu el la lanĉintoj de Ido) en 1893.



La Bulonja Deklaracio neniel koncernas la verdan stelon. Krome multo ŝanĝiĝis de tiam. Por hodiaŭa homo la verda koloro simbolas ne esperon, sed ekologiismon, kaj la sola kombino de koloroj kun internacie pozitiva signifo estas bluo plus blanko; same, la kvinpinta stelo simbolas ne la kvin mondpartojn (por tio tutmondaj organizoj, kiel UN kaj Unesko, uzas desegnon de la terglobo), sed revolucion, komunismon, Usonon, arab-islamecon aŭ kion ajn depende de la koloro. Ofte la verdaj steloj de la movado transformiĝas, en fotoj aŭ sur la kovriloj de niaj bultenoj, al akraj steloj blankaj, grizaj aŭ nigraj. Resume, la verda stelo diras nenion pri ni al la mondo kaj aldone ne kapablas funkcii kiel deekstere rekonebla identigilo.

Ĝuste tion bezonas la esperantistaj asocioj: klaran aleksteran bildon, simplan kaj nemiskompreneblan. Kaj tia estas la jubilea simbolo, kiun ni povas renomi, por ties nova rolo, *la ovalo* (kaj, ŝerce, *la melono* aŭ *la pilko*, se necese).

Esperantistoj ne bezonas porti ovaleton sur la brusto, nek adori kaj himni flagojn kaj ovaletojn dum la fermoj kaj malfermoj de kiaj ajn kongresoj. La ovalon ni bezonas maksimume por nia leterpapero, por niaj bultenoj kaj propagandaj eldonaĵoj, por libroj pri esperanto, por lerniloj...

Unu jarcento jam pruvis ne nur la neutilecon, sed eĉ la malutilecon de verdaj steloj por tiu celo. Kaj, ĉar verda stelo estas nek taŭga nek sankta, ni simple forgesu ĝin. Bedaŭrinde kelkaj personoj opinias ĝin sankta kaj netuŝebla, esenca kaj kerna. Verdire por ili la verda stelo estas nur surogato de kristana kruco, de serpo kaj martelo ktp, kio montras, ke ankaŭ esperanto estas por ili surogato de religio aŭ de politika partio.



Oni ne surpriziĝu, ke la agado de personoj, kiuj kultas verdan stelon kaj adoras diigitan Zamenhofon, aspektigas la tutan esperantistaron sekto antaŭ la okuloj de serioza publiko.


La lasta ĉenero en tiu ĉi kateno estas la fakto, ke por certaj t.n. esperantistoj la verda stelo iĝis surogato de esperanto mem. Multe pli facilas ornamati sian bruston per kvinunga verdaĵo kaj balbuti esperantajn saluton kaj adiaŭon por komenci kaj fini nacilingvan parolon, kaj tiel kredi sin esperantisto, ol lerni la lingvon konscie kaj konstante, praktiki ĝin por uzi ĝin senerare, trasenti ĝin sia.

Resume, ni uzu la praktikan ovalan simbolon kie kaj kiam ajn ĝi montros sin utila kaj dezirinda. Kaj pri la surogata stelo? Nu, eks pri ĝi.

*Georgo Kamaĉo*

# Aplaŭdinda iniciato en Eŭskio

Dum la sinsekvaj feritagoj 5-6-7-8 de la pasinta decembro, Eŭska Esperanto-Asocio aranĝis dunivelan rapid-kurson de Esperanto en kampara domo 15 kilometrojn proksima al Vitorio. La elementan nivelon gvidis Georgo Kamaĉo kaj partoprenis 12 homoj; la perfektigan gvidis la nuna verkanto kaj partoprenis 16 homoj. Ĉiu aliĝinto pagis 9.500 p-tojn por (ja abunde!) manĝi, dormi, kaj ĉeesti la kursojn (duhore matene kaj duhore posttagmeze; entute 14 horoj). Preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj aĝis inter 17 kaj 35 kaj devenis el Vitorio, Bilbao kaj Navarra.



Principe, la elementa nivelo taŭgis por komencantoj sen antaŭa scio pri Esperanto kaj la perfektiga celis jamajn parolantojn, kiuj almenaŭ pasive komprenas la lingvon. Ekster la kursa programo, okazis aliaj diversaj aktivaĵoj: ekskursetoj, bierumado, spektado de diapozitivaj kaj prelego pri la Esperanta literaturo. Unutage vizitis nin Miguel Gutiérrez Adúriz, konata eldonisto (Sferoj-serio), senlaca movadano kaj elstara tradukisto el la hispana en nian lingvon.

Miatakse, la sperto postlasis tre pozitivan spuron ĉe ĉiuj partoprenintoj. Tia rezulto certe ne eblus sen la klopodoj kaj demarŝoj (flugfolioj, afiŝado, ĵurnal-reklamoj k.s.) de la vitoriaj junuloj ĝenerale kaj de Iñaki Gauna kaj Rafa Blanco specife: al ili nia ŝuldata danko. Mi tuj diru, ke la instruantoj ne nur ĝuis ĉies prizorgon kaj eĉ dorloton, sed ankaŭ rericevis ĉiujn elspezojn plus honorarion: la eŭskaj esperantistoj denove pruvis sian bonegan organiz-kapablon.

Similan kurson mi ŝatintus partopreni kiam mi estis komencanto: la etoso kvazaŭ miniaturis tiun de la porjunulaj internaciaj kongresoj, la plej ĵusaj esperantistoj povis rekte kontakti nialandajn elstarulojn kaj eksciis pri esperantaĵoj fakte konataj nur de plurjaraj lingvanoj. Tia kurso fareblas en malgrandaj regionoj, kia Eŭskio, kaj mi ŝatus nun emigi aliajn provi. Lastatempe mi parolis kun junaj katalunoj kaj valencianoj pri la afero: se nur estas emo aktivi, ĉefe amas-propagande, similaj kursoj povos okazi ankaŭ ĉe ili. Kiu do imitos la eŭskojn?

*Antonio Valén*

# KIEL VIGLIGI LA ESPERANTO-MOVADON

Malgraŭ tio, ke tiu anoncita temo estas sufiĉe kompleksa, mi provos ĝin resume trakti en du punktoj, koncize reflektantaj la kriterion de senpretenda veterano esperantista.

Unua punkto: Kvankam mi estas konscia, ke nia vivmaniero grandapaŝe evoluis, tial ke modernaj elementoj, inter ili la aŭto kaj la televido invadis la liberan tempon de la homoj, kaj iel ŝanĝis iliajn tradiciajn kutimojn, mi tamen konsideras, ke ni, la esperantistoj, nepre devas reagi al tiuj cirkonstancoj. Unualoke ni devus aktualigi, kaj laŭokaze reĝustigi la ĝisnunajn labormetodojn, de niaj Esperanto-klubo, per novaj konceptoj, kiuj prioritare devus celi, krom la varbado de junaj membroj, la konservadon de tiuj malnovaj, sed precipe de tiuj progresintaj gekursanoj, kiuj jam lerninte Esperanton, ofte ne povas ĝin apliki pro manko de adekvata medio.

Sekve, estus ja necese, ke ĉiu Esperanto-klubo pretigu interesan planon, kun alloga programo de kulturaj aranĝoj, gravaj prelegoj, instruaj vizitoj kaj ekskursoj, komentariataj sonbendoj, videoprojekcioj, konversacioj ktp, en kiuj Esperanto laŭeble ludu ekskludan rolon.

Sed, kion antaŭ ĉio devas flegi ĉiuj esperanto-klubo, nome estas la pruntado de libroj kaj revuoj al la progresintaj gelernantoj, kaj al ceteraj interesatoj legadi en nia lingvo, paralele kun starigo de praktik(ig)aj, interparolaj rondoj daŭre organizataj, en kiuj Esperanto estu vivavoĉe parolata, laŭeble sub la gvidado de sperta esperantisto, kiu orientu kaj laŭokaze korektu la gekonversaciantojn. Nur tiel ni evitos krokodilantojn en la Esperantaj kongresoj, kaj nur tiel ni same evitos la certgrade pravajn kritikojn de niaj kontraŭuloj, kiuj skeptike diras, ke "la esperantistoj fervore propagandas Esperanton, sed en la praktiko ili uzas nur la nacian lingvon". Estas do diverskaŭze konsilinde, ke ni ĉiam klopoĉu paroli en Esperanto, kompreneble, kiam ni konversacias kun esperantistoj.

Dua kaj fina punkto: Akorde kun kelkaj diverslandaj kompetentuloj, ankaŭ mi konsideras, ke nia Movado devus reveni al la Zamenhofa principo, laŭ kiu la esperantistoj devas kontribui, tra la lingvo Esperanto, al pli granda frateco kaj justeco inter la popoloj tutmondaj. Sekve, ni devus samtempe strebadi kaj por la disvastigo de Esperanto, kaj por la diskonigo de ĝia "Interna Ideo". Tio ja neniel supozigas, ke oni devas nepre rezigni proprajn idealojn aŭ kredojn, ĉu naciajn, religiajn, politikajn ktp, sed tute kontraŭe: ĉiu esperantisto ja rajtu flegi, kaj kompreneble daŭre propagandi, siajn plej amatajn konvinkojn. Konsekvence, tiu frateca kaj justeca mistiko de la "Interna Ideo" de Zamenhof, eksklude funkcii kiel humanisma bazo de la lingvo, sur kiu la plej diferencaj kriterioj homaj kunvivu "kun unueco en

diverseco", kun reciproka respekto de sentoj kaj opinioj inter ĉiuj personoj, senescepte.

Kiel klarigas la Plena Ilustrita Vortaro (PIV), la Internacia Lingvo Esperanto estu necesa premiso, t.e., kondiĉo kaj bazo de internacia solidareco, kio ja estas noblacela idealo, kiu certe altiros la simpation de ĉiu progresema persono. Ŝajnas, do, ke tiu ĉi estas la sekvenda vojo, nome iel ligi la Esperantismon kun ĝia humanisma mesaĝo. Per tio mi finas.

*V. Hernández Llusera*

---

## NEKROLOGOJ


Al nia Redaktejo alvenis la malĝoja novaĵo pri la forpaso de Laudelina Solís Fernández, edzino de nia veterana membro Sacramento Collado Llana, loĝanta en Gijón (Asturio). Ni kore kondolencas nian karan samideanon pro tiu dolora perdo.

Ankaŭ ni sciiĝis pri la forpaso de unu el la plej agemaj esperantistoj de la Esperanta Grupo de Alikanto, samideano Evaristo Verdū Gisbert. Niaj pensoj flugas al liaj edzino, filo kaj nepino, kiujn ni elkore kondolencas.

En la lasta minuto, kiam la nuna numero de "Boletin" estis jam redaktita, alvenis la trista novaĵo pri la forpaso pasintdecembre en Terrassa, de samideano Josep Cervelló i Garí, membro de KAE kaj de HEF, grava aktivanto en la filatela kampo kaj homo tre afabla kaj altruisma. Al lia edzino kaj gefiloj KAE kaj HEF esprimas korsentan kondolencon.

---

*deziras*



*korespondi*

S-ro Saied Nasr; Mirdamad St. Naft St. n° 26/19187, "Islamic Azad Univerczty" TEHRAN. Iran.

S-ro Muhammad (Benita de Allah). La vivo de la islama profeto, 16-paĝa libreto. Prezo 1 int.rpk. S-ro Amjad Bult. Esperanto-Domo, Short Cut Road. Murree 47150-Pakistan.

Gérard Fleuter, 29 bis, rue de la Fontaine. F - 7 7 7 1 0 VILLEMARECHAL, dez. kor. kun esperantistoj meteologoj de la Eŭropa Komunumo.

Tapani Lappalainen; Kivalakotikylä, SF-37500 LEMPÄÄLÄ. Finnujo. dez. kor. pri muziko, filatelio, kantado kaj diversaj kolektadoj.

# JARABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 1993

**BOLETIN**, organo de HEF. Dumonata (escepte dum somero).

Membreco kun la revuo	2.000,-
Emerito, junulo, senlaborulo	1.500,-
Asocio aŭ Grupo	4.000,-
Por esperantistaj societoj, 10 ekz	10.000,-
Dumviva membro	200.000,-
Eksterlanda abono	35 gld. aŭ ekvivalento.

Uzu la konto-numeron de HEF ĉe Caja Postal n-ro 14.011.966. Oni ne pagas aldonan koston, kaj eblas "transdoni" la monon en ajna oficejo de Caja Postal (la Poŝto) en urboj kaj vilaĝoj.

## U.E.A

Membro-abonanto (jarlibro + revuo)(Junulo ricevas <i>Kontakto</i> -n)	4.400,-
Abono al la revuo Esperanto	2.640,-
Abono al <i>Kontakto</i>	1.320,-
Membro kun jarlibro (ne la revuo)	1.760,-
Membro kun Gvidlibro (minimuma kategorio)	705,-
<b>Monato</b>	<b>3.500,-</b>

Peranto s-ro Juan Azcuénaga Vierna, Gral. Dávila, 127. Portal 7, 2º izq. 39007-SANTANDER. Bankkonto en Caja Postal Ctta. n-ro 0454.85.31.

## Sennaciulo, ĉiumonata organo de S.A.T.

Baza kotizo de SAT-membro	3.000,-
Emerita kotizo	2.250,-
Jarabono "Sennaciulo"	1.600,-
Abono "Sennacieca Revuo"	450,-
HALE-membro (SAT-ano)	500,-
Jarabono "Kajeroj el la Sudo"	800,-
Jarabono "Kajeroj el la Sudo" en guldenoj aŭ ekvivalento	16,- gld

Peranto: s-ro. Ramón Manau Torres, C/Montseny, 5 (piso) E-08208-SABADELL (Barcelona). Eblas pagi pere de la konto en Caixa de Pensions, Oficina 461. Lbta. 171-29 SABADELL.

## Heroldo de Esperanto, sendependa gazeto.

Jarabono	2.250,-
Peranto Luis Serrano Pérez, Font Nova, 32 E-08202 SABADELL(Barcelona) Hispanio.	

Rimarko: ĉiu kotizo estas en pesetoj, escepte de tiuj en guldenoj (gld).

**Depósito Legal: Z-334-90**  
**Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas**